Johannes R. Becher,

Kristnasko

tradukita de Manfred Retzlaff

Ekfloras nun en blanka vest'
la vintro en branĉaro.
Solece frostas birdo-nest',
la sonorilojn la krist-fest'
sonigas tra l' flokaro.

La spac' sin klinas super ni,
kaj ankaŭ ni kliniĝas.
Jen nova stel' ĉe la abi'.
Infan-sonĝece brilas ĝi,
elbranĉe ĝi vidiĝas.

Traduko de la Germana poemo "Weihnacht" de Johannes R. Becher *(∗1891-05-22 – †1958-10-11) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2002-12-02.*

MR-393-2 / Arg-794-1590 (2013-01-22 22:14:02)

Johannes R. Becher,

Weihnacht

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Johannes R. Becher *(∗1891-05-22 – †1958-10-11).*

Arg-794-1589 (2013-01-22 22:26:33)

Pri la poeto vidu la vikipedian retejon `http://de.wikipedia.org/wiki/Johannes_R._Becher`. *La poemo troviĝas ankaŭ en* `http://www.christmas4fun.de/dichter.htm`.